


Estarto

ELDONAS ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



1979 · 4 · (74)

KIEL AL SUNO OMBRO

apartenas
al moderna mastrumo
perfektaj elektroiloj kun
marko



Valoraj helpantoj por
ordigi vian loĝejon kaj
labori en kuirejo

Produkta

WE ELEKTRO-PRAGA HLINSKO **WE**

Post la 64-a Universala Kongreso en Lucerno

Labori pli efike



Pli ol 1.630 homoj lastfoje aplaudis la vere saĝajn vortojn de D-ro Tonkin. La kongreso estis riĉa ne nur programe kaj pro belega loko, kie situis kongreshalo, ne nur pro vere perfekte preparita organizo de ĉiuj detaloj, sed ĉefe pro la laboro de la komitato kaj estraro, pro la laboro de dekoj da komisionoj, kunvenoj kaj traktadoj. Kiuj ne estis okupitaj en kunsidoj de komitato povis elekti el pli ol 170 aranĝoj dum la kongresa semajno.

Tamen ŝajnas al mi, kiu unufoje partoprenis la kunsidojn de komitato de UEA, ke ni devis okupiĝi 90% pri detalaĵoj kaj tio nur pro ofte kapricaj sensencaj proponoj de komitatoj, kiuj povis jam sian opinion diri pli frue dum la antaŭaj jaroj /se mi nun pensas pri propono de nova statuto de UEA/, aŭ monatoj, se ni parolas pri la laboro de UEA. Nur dank' al vere demokrate gvidataj kunsidoj de UEA flanke de D-ro Tonkin ni povis fini la laboron dum la kongreso kaj prepari la ĝeneralan voĉdonadon de moderna projekto de la Statuto, kiu respektas novajn kondiĉojn, novan situacion en esperanta movado kaj la mondo. Oni povas diri, ke nova statuto estas pli demokrata kaj pli neutrala ol la estinta. Certe, la kongreso en Lucerno montris al ĉiuj, kiuj dubis pri la nova vojo de UEA, ke ĝi ne perdis sian ĝisnunan neutralan evoluon, ke ĝi farigis pli forta ol ĝi estis, ke en UEA ne estas loko por aventuristoj, por homoj kiuj povis uzi la organizaĵon ĉefe por propra populareco. Estas bone, ke tiuj homoj mem foriris kaj nun staras antaŭ la Movado kiel nedemokrataj kaj ne neutralaj fortoj. Ĉiu ilin konas, ne indas ion aldoni pri ili.

UEA estas en la stadio de disvastiĝo kaj ne nur en Eŭropo, eblas diri ke en ĉiuj teritorioj. Aligis novaj asocioj kaj estis akceptitaj dum la kongreso du pluaj - el Ĉilio kaj Portugalio. Estis fonditaj aŭ oni preparas fondon de novaj administraj centroj, kiuj kunigos personojn kaj instituciojn, kiuj povas helpi al la Movado. UEA tamen staras ĉe la komenco de nova, eble pli vasta kaj pli decida evoluo. Multaj laboroj estis finitaj, sed estis bezono fari pli multe.

Estas certe multe da problemoj - ne ĉie niaj klopodoj estas ĉiam akceptataj. Ni trovas ankaŭ malfermitajn pordojn. Ofte nur pro tio, ke la homoj ne estas ankoraŭ konvinkitaj pri utileco aŭ perspektivo de nia Movado kaj de la Internacia lingvo. Ni ne frapu sur tiujn pordojn, sed ni eniru tiujn, kiuj estas malfermitaj. Tie ni povas agi.

Homoj ofte multe laboras por la movado, donas siajn liberajn horojn al la Movado, sed ni decidu ankaŭ mem pri efektiva laboro. Ni ne faru ĉion, ni klopodu atingi intereson de profesiuloj kaj utiligi ilian profesion kapablecon por nia Movado. Tiamaniere estos niaj atingoj pli efikaj.

Tio estis nur kelkaj el interesaj ideoj en la finparolado de D-ro Tonkin. Mi certe ne troigas, dirante ke ne ofte sta-


ras en la gvida funkcio de E-organizo tia homo. Bedaŭrinde, ke li ne povas plenumi pli longe la funkcion.

Kongresa flago estis transprenita de Sveda Esperanto-Asocio, kiu organizos estontan kongreson en Stokholmo de la 2-a - 9-a 8.1980.

Zd. Křimský



Ĉeestantoj atente aŭskultas Dr. Tonkin



Finaĵaj vortoj



Dum la oficiala inaŭguro ĉeestis ankaŭ la kultura sekretario de nia ĉeĥoslovaka ambasadejo en Berno



Dum renkonta vespero parto de finna grupo en naciaj kostumoj

MESAĜO

DE LA PREZIDANTO DE ĈEA d-ro J. Jermář

Kiel prezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio mi salutas en la nomo de ĉiuj ĉeĥoslovakaj esperantistoj kaj ankaŭ en la propra nomo la 64-an Universalan kongreson en Lucerno.

La kongresa temo "La lingva aspekto de internacia organiziĝo" respondas al la aktualaj demandoj kaj problemoj de la homaro en la koma kaj atoma epoko: ni esperu, ke tiu ĉi kongreso jam

per sia ekzisto - sed ankaŭ per sia fruktodona laboro - montros la solan solvon de ĉiuj lingvaj problemoj. Ni ankaŭ esperu, ke ĉiuj esperantistoj komprenos en tiu ĉi decida tempo la neceson de forta kaj unueca tutmonda Esperanto-organizo, kiu pretas tiamaniere servi, helpi kaj ekspliki al la internacia publiko nian solvon de la interlingva problemaro.

INTERESAJ INFORMOJ PRI LA KONGRESO

- 1/ Kongreson partoprenis aŭ salutis oficiale unuan fojon ankaŭ diplomato el Kubo kaj Unuiĝo de Afrikaj Ŝtatoj;
- 2/ Gazetoj kaj radioelsendoj regule informis ĉiutage pri la dumkongresaj aktualaĵoj - vidu unu eltiraĵon el la gazeto Vaterland;
- 3/ Kongresanoj ĉiumatene povis ricevi la plej freŝajn informojn en Kongresa Kuriero;
- 4/ Laŭ niaj informoj aliĝis al la Kongreso pli ol 40 ĉeĥoslovakoj;
- 5/ Ploj intencas prepari por la 65-a Kongreso en Stokholmo specialan ŝipon, en kiu oni loĝos kaj mangos. Aliĝi vi povos pere de nia asocio. Kondiĉoj estas similaj kiel ĉi-jare;
- 6/ Esperanto-telero, tio okazis ofte dum la UK: oni ne havis multan tempon, sed tamen la stomako deziris sian adekvatan porcion, riceveblan en la restoracio de la kongresdomo. Se oni mendis tiun E-teleron, oni estis tuj priservita. La E-telero samtempe estis la unua menciita menuo sur germanlingva menukarto;
- 7/ En la kongresa halo estis ankaŭ monŝanĝejo, kies bankoficistoj speciale lernis

nis Esperanton por deĵori.

Antaŭ la Kongreso vizitis nian landon kaj estis gastoj de nia asocio 25 gekongresanoj el Finnlando. Gvidandoj de grupo estis s-ino Marjatta Linjama kaj sekretario de Finna Esperanto-Asocio s-ino Heta Kesälä.

Nia asocio preparis por ili malgrandan programon kun tranrigardo de Praha kaj Melnik. Sur foto s-ano J. Vitek kaj Heta Kesälä en la muzeo Liběchov.



visa^K smetol



lahôdkové mliečné margaríny na prípravu chutných koláčov

*konataj laktaj margarinoj

Maslové, linecké, orieškové a iné cestá ľahko pripravíte s použitím niektorého z lahôdkových mliečnych margarínov.

VISA a SMETOL rovnako výborne vyhovujú na prípravu kysnutého cesta, cestá v prášku ako sú linecké s kokosom, vanilkou a pod.

staj kukoj



por preparo de bongustaj kukoj

Nr. 173 Samstag, 28. Juli 1979

Vaterland

Stadt und Region Luzern

Der grösste Kongress im Jahre 1979

1520 Esperantisten in Luzern

W. «Wir heissen die Teilnehmer des 64. Esperanto-Weltkongresses in Luzern willkommen und wünschen Ihnen einen angenehmen Aufenthalt in der Schweiz sowie eine erfolgreiche Tagung, lautet das Grusswort des Verkehrsvereins Luzern. Es ist verständlich, dass sich das Kongressbüro über diese Veranstaltung freut, ist es doch der grösste Kongress der 1979 in Luzern abgehalten wird und einer der wichtigsten der dieses Jahr in der Schweiz zur Durchführung gelangt.

Bonvenon al la 64-a Universala Kongreso de Esperanto en Lucerno

Jen artikolo el la gazeto "Vaterland" pri nia kongreso. Ĝi informas, ke la kongresa oficejo de Lucerno ĝojas pri tiu aranĝaĵo, ĉar ĝi estas la plej granda en Lucerno ĉi-jare kaj "unu el inter la plej grava, kiu ĉi-jare estas okazigita en Svislando". Rigardu ankaŭ la enkadritajn vortojn.

◻UNUA TUT-AMERIKA

ESPERANTO-KONGRESO◻

La esperantistaron de la tuta mondo ni informas, ke de la 12-a ĝis la 15-a de Julio 1980 okazos en la urbo San Luis en Argentino la Unua Tutamerika Esperanto-Kongreso.

Amerikanoj kaj neamerikanoj estas kore invitataj partopreni en ĉi tiu festo, kiu okazos en urbo San Luis malavare dotita de la Naturo kaj kie ĝiaj loĝantoj kaj konstruaĵoj estas esprimoj de enlandaĵ argentinaj karakterizoj.

La organizantoj entreprenis la starigon de aktuala impona ekspozicio por elmontri la eĥon de ĉi tiu evento en la tuta mondo kaj konsekvence la ampleksan disvastigadon de Esperanto.

Tial oni petas la geesperantistojn de la tuta mondo, ke ili de nun sendu salutojn por la kongreso, preferinde per poŝtkartoj. Libroj, revuoj, bultenoj en Esperanto estos bonvenataj, precipe se ĉi-lastaj enhavas anoncojn pri ĉi tiu kongreso.

Bonvolu adresi vian korespondadon al: Tutamerika Esperanto-Kongreso, Casilla Correo Central 289, 2000 Rosario, Argentino.

Ni dankas vian helpon.

Enrique Kohei,
respondeculo pri Internaciaj Rilatoj

PRI „KONTINENTO SEN INTERPRETISTOJ” DE O. KNÍČAL

Mi tre atente tralegis la broŝureton kaj mi devas diri, ke tiu verketo estis tre bezona por propagandlaboro, pri kaj por Esperanto movado, sed mi pensas, ke ĝi bezonas pli grandan propagandon, ankaŭ en neesperantistaj gazetoj.

A. Bombionka

MULTEKOSTA TRADUKADO

Ĉu ekzistas ia statistiko pri tio, kiajn monsumojn oni elspezas en nia patrujo por la interpretado kaj tradukado linge kun oficialaj internaciaj kontaktoj, kaj kiom kostas lerneja instruado de la tn. mondlingvoj, demandis la Hungara Vivo financministron de Hungara Popola Respubliko L. Faluvégi. Kaj la respondo?

Eblas nur sajnigi ampleksojn de tiuj ĉi kostoj helpe de kelkaj faktoj. La stata budgeto ĉiujare elspezas proks. 1,5 miliardon da forintoj por edukado en gimnazioj kaj fakaj mezlernejoj. Fremdlingva instruado okupas proksimume 15% de la tuta kvanto de mezlernejaj instruhoroj. En la jaroj 1977 - 1978 en universitatoj studis 65 mil. Krome entute 17 diversaj lingvoj estis tie instruataj. Pli ol duono de la instruistoj lernas la anglan, kvarono la germanan, proksimume 10% la latinan kaj ĉirkaŭ 7% la francan. En la pasinta jaro la edukaj kostoj por unu studento de la tagaj kursoj sumis 46 mil forintojn. La studentoj de la fakoj pleje postulantaj lingvoscion lernas lingvojn dum 30 procentoj de la instrutempo, en aliaj fakoj dum ties 6 - 10 procentoj.

La Tutlanda Oficejo pri tradukado kaj Autentigo de Tradukadoj enspezas ĉiujare po 48 - 50 milionoj da forintoj por siaj servoj pagas preskaŭ ekskluzive nur entreprenoj kaj instancoj. La Teknikaj Biblioteko kaj Centro pri Dokumentado ĉiujare elspezas por tradukado de teknika literaturo meze po 30 milionoj da forintoj. Funkcias tamen pluraj similaj centroj, sekve la menciitajn kostojn por tradukado eblas multobligi ...

(r)

►LINGVA SEMINARIO EN NITRA◀

Inter la 8. - 10.6.1979 unue okazis "Seminario por lingva pliperfektigo de lektoroj kaj instruistoj de la lingvo Esperanto", kiun organizis Rondeto Esperanto ĉe Parko de kulturo kaj ripozo en Nitra. Okazis prelegoj en Esperanto pri eminentaj slovakaj aŭtoroj - esperantistoj D-ro Škarvan kaj J.V. Dolinský pri Metodoj de instruado de Esperanto kaj pri la Organizado de kluba vivo. Oni preparis projekciadon de dispozitivaj, dancvesperon, aŭtobusan ekskurson al arbore-

to Mlýňany kaj viziton al Agrikultura muzeo kaj de la historia burgo Nitra kun esperantlingva klarigo de Ing. Kolář. Enkadre de la seminario kunidis ankaŭ Centra Komitato de AE SSR, Pedagogia Sekcio kaj la regionaj komitatoj de AE SSR.

La seminarion partoprenis ĉ. 50 personoj el Slovakio kaj prezidanto de Pedagogia Sekcio de ĈEA V. Echtner.

La arango estis sukcesa kaj oni planas ĝin organizi ĉiujare. La venontjara okazos dum la tagoj 20. - 22.6. 1980.

(j1)

JUNULARA ETAPO EN SET


SET LANĈOV - La unua ĉi-jara etapo de Somera Esperanto-Tendaro estis junulara, tio signifas, ke ĝin gvidis kaj partoprenis precipe gejunuloj. Nekalkulante unu pli agan instruiston havis la ceteraj estraranoj de la tendaro mezan agon de 26,2 jaroj kaj la gekursanoj de 20 jaroj. La etapon partoprenis 79 gekursanoj, ĉeĥoj, slovakoj, 12 poloj, 11 hungaroj kaj 1 anglo. El ili estis 15 infanoj ĝis 13-jaraj, 32 glermantoj 14-18-jaraj, 20 gejunuloj 19-26-jaraj kaj nur 12 plenkreskuloj. Oni instruis en tri kursoj por komencantoj, en unu por progresintoj kaj en unu konversacia. Okazis ankaŭ kunveno de junulara komisiono kaj prelego pri ĝia laboro. La tendaranoj vizitis kastelon en Vranov, ekskursis al Znojmo, sipis sur la barajlago, kantis ĉe tendarfajroj, konkursis, sportis. Fine de la etapo tri gejunuloj kaj unu plenkreskulo trapasis la asocian ekzamenon kun rezulto eminenta.

SEMINARIO - La junulara komisiono preparas jam la 19-an junularan seminarion, en kiu oni instruos 30 es-tontajn funkciulojn de la asocio kaj de lokaj grupoj. La seminario, kiun finansas ĈEA, okazos aŭtune en Karlovy Vary.

RENKONTIĜOJ DE LA JUNULARO - Por ceteraj gejunuloj la junulara komisiono intensigas arangojn printempajn renkontigojn kun turisma kaj amuza programoj kaj pluan someran etapon de SET Lančov.

LA OKCIDENTBOHEMIA JUNULARO tre aktivas, kiel montras ilia bulteno, plena de diversaj turismaj arangoj kaj informoj pri diversaj Esperantaj okazaĵoj kaj pri geografiaj memorindaĵoj de la regiono. Ni gratulas.

INTERKLUBOJ - Kiel modeloj de Esperantaj porinfanaj kluboj de internacia amikeco povas servi rondetoj ekzemple en Netolice, Pardubice-Studánka kaj Vraňov. Espereble audigos ankaŭ aliaj porinfanaj kluboj, por ke ni povu enskribi ilin en nian junularan kronikon.



**dobrý den
vám všem
a navíc stále
zdraví
přeje**



pohodlné nákupy s katalogem MAGNET č. 13
poštou na dobírku (cena 17 Kčs) zasílá
MAGNET, 532 36 PARDUBICE

LASTMOMENTE VENIS LETERO EL ITALIO

Karaj geamikoj,
dum la Universala Kongreso en Lucerno mi havis okazon ricevi ekzempleron de via revuo STARTO. Reveninte hejmen mi legis ĝin kaj mi sentis la bezonon skribi al vi por gratuli vin pro ĝi. STARTO iĝas pli kaj pli interesa kaj leginda ankaŭ fare de neĉeĝaj esperantistoj. Se vi bonvolos sendi al mi dudekon da ekzempleroj de la venonta numero, mi zorgos pri sendado al kelkaj eblaj interesiĝantoj en Italujo por ke ili legu ĝin kaj eventuale abonu ĝin. Ankoraŭfojajn gratulojn kaj amikajn salutojn

Renato Corsetti

Renato Corsetti
Via Strabone, 1 00176 Roma Italujo

RETIRIĜO DE LA ANGLA?

Versajne unuafojan sciencan voĉon oni aŭdas pri tio, ke la disvastigo de la angla venonte ĉesos. Tion esprimas S. F. Starr, sekretario de "Kennan Institute for Advanced Russian Studies of the Wilson Center in Washington" en la usona revuo Change /majo 1978/ sub la titolo "English Detroned".

La angla estas hodiaŭ parolata de ĉ. 350 milionoj da homoj kiel gepatra lingvo, plej multe post la ĉina. Ĉe pli multnombraj estas parolantoj de la angla kiel de la dua lingvo. Ankaŭ en Ĉinio la angla estas nun la plej lernata lingvo; antaŭ tio estis la rusa. En Francio ekz. 80% de la lernantoj en duagrada lernejo preferas la anglan kontraŭ la germana, hispana kaj itala. La plej satataj vojaĝaj celoj estas ankaŭ angle parolantaj landoj. Oni taksas, ke 70% de la internaciaj postaĵoj komunigas pere de la angla.

Tamen la faktoroj, kiuj kondukis al tiu rezultato, ne kun la sama forto efikos en la estonteco. Unue, la angla malpliiĝos kiel gepatra lingvo pro la malkresko de la nombro de naskiĝoj. En antaŭaj kolonioj oni pli aplikos la hejman lingvon, ekz. en Tanzanio svahilo disvastigas forpusante la dialektojn kaj - la anglan. Malpliiĝas bezono pri anglalingvaj libroj (en Azio kaj Afriko en la jaroj 1967 - 1972 je du trionoj resp. unu duono), aliflanke pliiĝos la sciencaj publikadoj en la rusa, japana kaj araba. Pli kaj pli la produktado de varoj kaj servoj kreskos en neanglalingvaj landoj, kio sume kondukos al lingva egaligo.

(r)



**RAPIDA AĈETO
EN URBOCENTRO**


PRIOR
BRATISLAVA

INTERNACIA ORGANIZO, KOMUNIKADO

KAJ LINGVOJ

Prelego de s-ro Robert Muller
Sekretario de la Ekonomia kaj Socia Konsilio
de Unuiĝintaj Nacioj

Kiam la historiistoj pristudos nian epokon por el-
pentri ties fundamentajn trajtojn, ili sendube akorde kon-
kludos, ke la finon de la dudeka jarcento esence karakterizis
du fenomenoj:

(1) planedskala konsciigo, kiu ne havis precedencon
en la tuta homara evoluo,

(2) mutacio de la naturo mem de la homa specio.

Koncerne la unuan fenomenon, ni konstatas, ke ekde la
fino de la dua mondmilito, abundego da problemoj, kiuj ĝis
tiam pli malpli stariĝis nur je nacia aŭ regiona nivelo,
senĉese vastiĝas al tutplaneda skalo. Historio, kia ĝi nun-
momente disvolviĝas sub niaj okuloj, esence turniĝas ĉirkaŭ
du polusoj, aŭ estas ludata de du kunroluloj: la homa specio,
kiu fariĝis superreganta, kaj nia eta planedo Tero. Kiom ajn
reliefigas, sur la vasta fono de historio, la naciaj kaj
grupaj celaroj, idealoj kaj problemoj, malfermiĝas ĉapitro
tute nova: la homaro finfine serĉas sian optimalan lokon,
disfloradon, pacon, harmonion kaj feliĉon sur planedo nun
ĝisfunde konata, kiun la homo kapablas transformi kaj admin-
istri por ĉies plej granda bono. Jen estas la defio, la giganta
tasko, al kiu la nova epoko, jam larĝe malfermita, devos nun
respondi. Ĉiuj krizoj, timoj, angoro, difinoj de starpunkto
kaj konfliktaĵaj situacioj, kiujn ni ĉeestas, estas nur epi-
fenomenoj sur la evoluada ondegto ekkaptinta la homaron.
Jaron post jaro, la vastaskalaj prizorgoj naskataj de tiu
nova fazo en nia evoluo ĉefrolas en la historio, forpuŝante
al la postscenejo la krian protestadon de l'nacioj kaj de
multnombraj aliaj grupoj, kiuj plu malprave imagas, ke his-
torio, estanteco kaj estonteco aksiĝas ĉirkaŭ ili.

La dua fenomeno ne estas malpli giganta: ekde la indus-
tria revolucio, kaj ĉefe rezulte de la sinsekvaj ondoj de
sciencaj revolucioj, kiuj de tridek jaroj konstante manifesti-
ĝas, la specio homa fariĝas nova specio. La efiko de niaj
fizikaj kaj intelektaj kapabloj, same kiel de ĉiuj niaj sensoj,

aŭ de preskaŭ ĉiuj, ja mirakle ampleksiĝis: uzinoj kaj mironvekaĵoj maŝinoj multobligis nian manforton, dum nian fizikan movkapablon obligis transportiloj pli kaj pli rapidaj; nia vidpovo atingas la senfine grandan dank'al gigantaj teleskopoj, kaj la senfine malgrandan per elektronaj mikroskopoj, pikoskopoj kaj nubokameroj; nia aŭd-radiuso etendiĝas al la tuta tero kaj al la spaco trans-atmosfera dank'al telefonio kaj radio; nia cerba kapablo memori, kalkuli kaj inventi mireginde multobligis dank'al la komputoroj. Ni "tele-vidas", ni "tele-parolas" kaj ni eĉ "tele-laboras", ĵa sur Marso instrumentoj analizas por ni la grundon de tiu planedo. Kaj tio estas nur la komenco de procezo ege pli vasta: la plimulto el la progresoj, kiuj aperis, dum la homaro tiel transcendiĝis kaj mutaciis, ja okazis nur sur la kampoj materia kaj mensa. La homo ankoraŭ devas etendi la dimension de sia spirito, de sia animo kaj de sia koro al la tutaj tero, homaro, kaj eĉ universo, por plene realigi sian disfloradon. Tiu nova dimensio baldaŭ ankaŭ impone ekbrilos en la nova erao, kiu malfermiĝas antaŭ ni.

Tiuj du fenomenoj eble plej elstare respeguliĝas en tio, kion oni povas ĝenerale nomi "internacia organiziĝo", t.e. en la tuto de la aranĝoj kaj rimedoj internaciaj kaj mondaĵ, kiuj celas respondi al tiu evoluo, aŭ eĉ ĝin akceli. Inter tiuj rimedoj, kiel ĝuste rimarkigis via prezidanto, Prof. Tonkin, en sia referaĵo alkongresa, unuavice troviĝas la Unuiĝintaj Nacioj kaj ties specialigitaj institucioj, kiujn li priskribas kiel la plej disvolvitan mondan organizon, kiun la homoj iam ajn kreis, sed citindas ankaŭ la grandaj religioj, la transnaciaj entreprenoj, la regionaj komunumoj kaj grupiĝoj, same kiel la internaciaj privataj asocioj kun scienca, profesia aŭ alia karaktero, da kiuj dekoj da miloj nuntempe ekzistas, kaj kiuj iĝas pli kaj pli multaj kaj vastaj.

Eble la plej impresa maniero ilustru tiun fenomenon estas simple listigi la 32 specialigitajn instituciojn kaj mondajn programojn, kiuj kune konsistigas la UN-sistemon. Jen mi ilin citos, petante vin pripensi ĉe ĉiu nomo pri la amplekso de la planeda kaj homa problemaro, kiun ĉiu el ili pritraktas.

La 18 specialigitaj institucioj estas la jenaj: Atomenergia Agentejo, Internacia Labor-Organizo, Nutraĵa kaj Agrikultura Organizo, Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo (UNESCO), Monda Organizo pri Sano, Internacia Banko, Internacia Asocio por Evoluigo, Internacia Financa Societo, Internacia Valuta Fonduso, Organizo pri Internacia Civila Aviado, Universala Poŝta Unuiĝo, Monda Meteorologia Organizo, Internacia Unuiĝo pri Telekomunikado, Internacia Martransporta Organizo, Interkonsento pri Doganoj kaj Komerco, Monda Organizo pri Intelektua Proprieto, Monda Turisma Organizo, Internacia Fonduso por Agrikultura Disvolvo.

Kaj jen nun la 14 mondprogramoj de UN: UN-Fonduso por la Infanaro, UN-Konferenco por Komerco kaj Evoluigo, Oficejo pri Naturaj Katastrofoj, Programo pri la Ĉirkaŭ-medio, Programo pri Narkotaj Drogoj, Alta Komisarejo por Rifuĝintoj, Organizo por Industria Disvolvado, Esplora kaj Trejna Instituto, Fonduso por Priloĝantaraj Agadoj, Agentejo por Helpado al Meza Oriento, Universitato de Unuiĝintaj Nacioj, Programo de UN-volontuloj kaj Tutmonda Nutraĵa Programo.

De tiu listo forestas la problemoj pri milito kaj paco, pri malarmado, pri la spaco transatmosfera, pri maroj kaj oceanoj, pri naturaj riĉaĵoj, pri homaĵtoj, pri egaleco rasa, pri virinoj, transnaciaj firmaoj, pri krimuleco, ktp, pri kiuj UN okupiĝas mem, ĝis la respektiva speciala institucio aŭ programo estos starigita.

Tiu tuta reto kovras la plimulton el la tutmondaĵ problemoj, al kiuj la homaro frontas, de la transatmosfera spaco ĝis la atomo, de la konservado de historia heredaĵo ĝis preparo de la estonteco, de la rajtoj de la homa persono ĝis la paco tutplaneda, de arto ĝis krimologio, de la infanaro ĝis maljunulaj problemoj, ktp. Nur la spirita vivo ankoraŭ mankas en tiu kosma terenaro, sed ankaŭ ĝi certe trovos iutage sian lokon en ĝi, kiel konstante antaŭdiris Dag Hammarskjöld kaj U Thant. Al mi, kiu servis UNon tridekjare, tiu kunaĵo aperas kiel la unua ero de vizio, cerbo kaj nervaro komunaj al la nova homspecio aŭ "transspecio", "metaspecio", nun kreiĝanta.

Centre de tiu problemaro staras la bezono komuniki. Starigi taŭgan sistemon por ebligi perceptadon, analizon, konkludadon kaj pripensadon, por difini valorojn kaj por transdoni mesaĝojn al ĉiuj membroj de la homa familio ja prezentas per si la centran problemon de nia epoko.

Vastatrajte skizite, la komunikada problemaro en UN prezentiĝas jene.

Verdire, la sistemo ne multe diferencas de tiu de la homa korpo: necesas vidi, percepti, aŭskulti, koni kaj rekonu la tutan ĉirkaŭaĵon spacan kaj tempan, en kiu la homa vivo disvolviĝas. Mondskale, tio fariĝas pere de vastega agado statistika, enketa, informkolekta kaj pristuda, al kiu miloj da internaciaj dungitoj sin dediĉas kun la celo helpi al abundo da kunvenoj, al larĝa gamo da fakulaj renkontiĝoj kaj al multaj politikistoj; prezenti kompletan tabelon de tiuj agadoj tute simple ne plu eblas, tiel ampleksaj ili estas.

Poste sekvas cerba funkciado: el ĉio ĉi necesas tiri konkludojn por la komuna bono de la homaro. Tio efektiviĝas unue en fakulaj kunvenoj, regionaj organoj kaj institucioj laborantaj super difinita kampo: la mondo ricevas konkludojn rilatajn al demografio, ekonomio, sociaj aferoj, laboro, sano, malsato, eduko, ktp. Poste venas la vico de la sintezantaj organoj, nome la Ekonomia kaj Socia Konsilio kaj la Ĝenerala Asembleo de UN, kies tasko estas malimpliki la ĝeneralajn tendencojn, la novajn minacojn kaj la akiritajn atingaĵojn, kaj rekomendi al la popoloj ŝanĝi sian sintenon, alpreni novan politikon kaj laŭnecese adapti sin al la ĝeneralaj sintrudaj realaĵoj, kiuj estis malkovritaj.

Finfine rolas la nerva funkciado: la ĝeneralaj konkludoj rilataj al la tuta homaro devas transdoniĝi al ĉi-lastaj. Ĉar, ho ve!, pro ĉiaspecaj kaŭzoj la distanco inter la internaciaj organizaĵoj kaj la popoloj estas tro granda, tiun funkcion esence plenumas la registaroj, la gazetaro kaj la aliaj informistemoj, la edukistaro kaj la neregistaraj organizaĵoj kiel la via. En la lastaj jaroj oni uzis la eblecojn, kiujn prezentas grandaj mondkonferencoj kaj internaciaj jaroj, kun la celo dissendi la mesaĝojn al la popoloj: konferencoj pri loĝantaro, ĉirkaŭmedio, junularo, virinoj, loĝproblemoj, nutraĵaj demandoj, akvo, dezertoj, scienco kaj tekniko, klimato, specialaj sesioj de la Ĝenerala Asembleo pri energio kaj evoluigo, internaciaj jaroj pri la infano, pri la kripluloj, pri komunikado, mondkonferenco pri maljunuloj, ktp.

Multe mankas, ĝis la sistemo estos plene kontentiga. Je ĉiu stadio, egale ĉu percepta, sinteza aŭ transsenda, ĝi ankoraŭ primitivas. Sed ĝi almenaŭ havas unu meriton: ĝi ekzistas, unuafoje en la homa historio, kaj mi estas konvinkita, ke la registaroj ĝin perfektigos de jaro al jaro por pluvivi mem, kaj por certigi, ke la tuta homaro pluvivos. Mia opinio, en nia evoluo la tempo venos, kiam tiu sistemo funkcios preskaŭ same instinkte kaj rapide, kiel nun, post milionoj da evoluojaroj, la homa persono funkcias. Estas simple demando pri tempo. La novaj kaj potencaj komunikrimedoj tion ebligas rapide. La mondon ŝanĝos precipe ili. Cetere, ĉiu generacio riĉiĝas per la antaŭaj spertoj, pli bona ĝenerala edukado, akcidentoj, mispaŝoj, eraroj kaj sukcesoj. La homaro ankoraŭ troviĝas je la stadio de kolektiva infaneco: ni ofte devas provi, ofte devas bruligi al ni la fingrojn, antaŭ ol ni lernas. Tre ofte, en mondaĵaj aferoj, ne intuicio, ne longperspektiva intelekta agado ebligas konscii pri problemoj, sed akcidento, aŭ situacio kriza. Sed ankaŭ la unuaj grandaj sukcesoj manifestiĝas: sufiĉis averti la homan familion, ke ĝi nombre iĝis troa, por ke ni povu hodiaŭ konstati malakcelon demografian; sufiĉis, ke la stokholma konferenco pri la ĉirkaŭmedio okazu, por ke ĉiu lando starigu tiuteman ministerion.

La ŝipo "Homaro" evitis multajn rifojn dank'al similaj ĝeneralaj avertoj, kaj la rimedoj investitaj en la UN-on fruktiĝis en riĉajn dividendojn.

Kie finfine situas lingvoj en tiu komunika reto, kiu iom post iom invadas la tutan korpon homaran?

Strange; la lingvo ŝajnas esti nur duaranga zorgo ĉi-stadie. Lingvoj similas naciojn: ili ekzistas kiel fruktoj de longa historio kaj evoluo en medio pli malpli izola; ili estas realaĵo, kiun ekstreme potencaj rimedoj defiendas. El realisma vidpunkto, nek la organizo de la mondo laŭ naciaj unuoj, nek la lingvomulteco montriĝas nuntempe ŝanĝeblaj. Ne la formo estas ĉefa, sed la substanco: necesas, ke la nacioj kunvivu pace, ke ili komprenu la kolektivajn problemojn, ke ili adaptu unu al la aliaj, ke ili alprenu la politikojn necesajn por la komuna bono de la homaro, ke ili malkreskigu siajn pretendojn kaj agresemon, ktp. La situacio iom similas rilate al lingvoj: la strukturo kuŝanta sub ĉiu lingvo homa, nome la konceptoj pri paco, justeco, bonkoreco, prospero kaj homa digno, finfine pli valoras ol la aparta formo, per kiu ĝi esprimiĝas.


La internaciaj sekretariejoj ĝenerale laboras dulingve: angle kaj france. La internaciaj kunvenoj de la UN plej ofte uzas kvin lingvojn. Kompreneble bedaŭrinde, ke kiam la interŝtata organizo naskiĝis, ĝi ne alprenis universalan lingvon, almenaŭ je la nivelo de sekretariejoj kaj internaciaj kunvenoj. Kiom koncernas perceptadon kaj transdonon, ni agas pere de la registaroj, de la gazetaro, de la neregistaraj organizaĵoj kaj de la edukistemo: tie tradukiĝas en la diversajn lingvojn la mesaĝojn kaj rekomendojn de UN kaj de la specialigitaj institucioj. Same kiel pri la politika strukturo de la planado, same pri la lingva strukturo ĉia diskuto videble evitiĝas en UN nuntempe: ekzistas tiom da substancaj problemoj, kiuj zorgigas la homaron, ke la formaj estas provizore preterlasitaj, ĝis pli favora tempo venos.

Lingve, la mondo prezentas jenan ĝeneralan bildon: ekzistas proksimume 5000 lingvoj, el kiuj nur duono havas skriban formon. Pluraj el tiuj lingvoj - la plej malaltaj sur la skalo de graveco - mortas ĉiujare. Supre, konstateblas, ke naskiĝas novaj lingvoj, precipe sciencaj, kiuj multobliĝas je konsiderinda ritmo: miloj da sciencaj terminoj ja ĉiunonate kreiĝas. Surkampe de la komputoroj, novaj lingvoj eĉ estas kreataj de firmaoj, kiuj certigas al si monopolon super ilia uzo. La internaciaj institucioj strebas enmeti iom pli da ordo tiukampe, precipe UNESKO, sed ankaŭ ĉiu specialigita institucio en sia sfero. Interesajn ekzemplojn oni povus citi, aparte sur la kampoj de saneco kaj aviado, sed ankaŭ sur aliaj. Tamen, verdire, ne ekzistas tutmonda lingva politiko. Malantaŭ tiuj sciencaj lingvoj staras la lingvoj uzataj por internacia

komunikado, ĉefe la angla kaj franca, kaj ankaŭ, pli kaj pli, la hispana. Post tiuj troviĝas la naciaj lingvoj, kies graveco ege diferencas laŭ la demografio, kaj kiuj estas tre profunde enradikiĝintaj, ĉar ili estas ligitaj al la politika, ekonomia kaj kultura fenomeno. Mi ne povas longe profundigi en la vasta gamo de la lingvaj problemoj ĉi-planedaj, kaj limigos min je subteno al la rekomendo de Prof. Tonkin, nome ke oni entreprenu ĝeneralan studon de la problemo, ke oni inventaru ĉion, kio tiukampe okazas, kaj provu alpreni tutmondan lingvan strategion por nia planedo.

Mi opinias, ke tiurilate la esperanto-movado kaj via kongreso povas ludi gravegan rolon. Ne pro tio, ke monda registaro aŭ universala lingvo nun ne aperas eblaj, ne pro tio oni evitu tion priparoli kaj diskuti. Tute male. La mondo senĉese bezonas modelojn, kiuj impresu al la imago kaj al la mondvizio de la homoj. Ni bezonas revojn. Preskaŭ ĉiuj grandaj mutacioj en la historio rezultis el revoj kaj pensoj viziaj. Eble hodiaŭ la mondo ne plu revas sufiĉe. Eble tial ni pasas tra pesimisma fazo ĝuste tiam, kiam ni staras je la montopinto de senprecedencaj sukcesoj kaj ĉe promesoj ankoraŭ pli vastaj. Kiam mi estis infano oni multe parolis pri esperanto kaj pri mondregistaro. Oni ilin mencias malpli ofte hodiaŭ. Tio ne estas bona. Necesas memorigi al la ĉkzistantaj povoj, ke sur nia planedo eblas aliaj administraj formoj. Tio almenaŭ prezentos tiun avantaĝon, ke ili fariĝos iom pli viziemaj kaj iom malpli necedemaj. Mi do tutkore deziras, ke el via kongreso fontu aldaca strategio, kiu denove tuŝu la imagon kaj la animon de la homoj. Tiun strategion devus akompani apartaj agadoj precipe direktitaj al la internacia komunikado kaj al ties ĉefaj rimedoj aŭ perantoj: UN kaj ties specialigitaj institucioj, la transnaciaj firmaoj, la gazetaro kaj aliaj informrimedoj, la religioj, la internacia eduksistemo, la internaciaj transportoj, la internaciaj neregistaraj organizoj, turismo, hoteloj, ktp.

Mi deziras al vi grandan sukceson en la nobla kaj viziista tasko, kiun vi prenis sur vin, kaj kiu estas nenio alia, longperspektive, ol starigi mondan demokratior, specife pere de la uzo de lingvo universala.



HALTU POR MOMENTO KAJ PENSU PRI VIA SANO

De tago al tago, de jaro al jaro vi senĉese ion kaptas, ĝis maksimumo streĉante la risorton de via sano. Kiel longe vi volas ankoraŭ toleri tion? Pripensu, ke vi havas nur unu sanon - kaj ebligu al ĝi por tre modera prezo tion, kion ĝi meritas : la kompleksan kuracadon en unu el la plej antikvaj kaj rekonataj banlokoj de Eŭropo.


ĈEĤOSLOVAKAJ BANLOKOJ
- oazoj de sano, trankvilo kaj inspiro -

KARLOVY VARY
FRANTIŠKOVY LÁZNĚ
MARIÁNSKÉ LÁZNĚ
JÁCHYMOV
TEPLICE V ČECHÁCH
PODĚBRADY
JÁNSKÉ LÁZNĚ - TŘEBŮŇ
JESENÍK - LUHAČOVICE
TEPLICE NAD BEČVOU
o o o o o o o o o o o

BALNEA
Reprezentanto
de ĉeĥoslovakaj
banlokoj
kaj kurac-fontoj,
Pařížská třída 11,
110 01 PRAHA 1
ĈEĤOSLOVAKIO
Tx: 122 215



**SANDRIK DOLNÉ HÁMRE N.P.
NOSITEĽ RADU PRÁCE
HODRUŠA-HÁMRE**



OD ROKU 1895 SA SANDRIK ZAOBERÁ VÝROBOU PRÍBOROV A ICH DOPLŇKOV. ÚSPECHY, KRORÉ DOSIAHOL ZA CELÚ SVOJÚ HISTÓRIU V OBLASTI KULTÚRY STOĽOVANIA SÚ OBROVSKÉ. VŠETKY DRUHÝ MATERIÁLOV POUŽÍVANÝCH NA VÝROBU PRÍBOROV A DOBOVÉ ESTETICKÉ TRENDY BOĽI ZASTÚPENÉ VO VÝROBNOM PROGRAME SANDRIKU. MOMENTÁLNE SANDRIK VÝRABÁ PRÍBORY A STOLNÉ NÁČINIE Z POSTRIEBRENEJ ALPAKY A NEHRDZAVEJÚCICH OCEĽÍ.

PRÍBORY ZNAČKY SANDRIK BOĽI A SÚ ZÁRUKOU PRVOTRIEDNEHO DESIGNU, KVALITY A UČELNOSTI. TIETO ICH VLASTNOSTI OCEŇUJE KAŽDÝ SPOTREBITEĽ.




EKDE LA JARO 1895 SANDRIK OKUPIČAS PRI LA FABRIKADO DE MANĜILAROJ KAJ ILIAS AKCESORAĴOJ. LA SUKCESOJ, KIUJN ĜI RIKOLTIS DUM LA TUTA SIA HISTORIO EN LA SFERO DE LA KULTURO DE LA ĈETABLA MANĜADO, ESTAS GRANDEGAJ. ĈIUJ SPECOJ DE MATERIALOJ UZATAJ POR LA FABRIKADO DE MANĜILAROJ KAJ LAŬEPOKAJ ESTETIKAJ DIREKTIĜOJ PARTOPRENIS EN LA PRODUKTO-PLANO DE SANDRIK. NUNTEMPE SANDRIK PRODUKTAS LA MANĜILARON EL LA ARGENTOTEGITA ARGENTANO KAJ RUSTOREZISTAJ ŜTALOJ:

LA MANĜILARO KUN LA MARKO "SANDRIK" ESTIS KAJ ESTAS GARANTIO DE LA UNUARANGAJ DESTINO, KVALITO KAJ CELHAVECO. TIUJN ECOJN POZITIVE PRITAKSOS ĈIU UZANTO.

chemho N.P. STRÁŽSKE

NOSITEĽ RADU PRACE



POZLACENÉ JUBILEUM MIKULÁŠOVICKÉHO KOVOPRŮMYSLU

Mikulášovičtí brusiči nožů a nůžek byli známi již v 18. století ve střední a částečně i v západní Evropě. A již v roce 1794 byla v Mikulášovicích založena první továrna na výrobu nožů a nůžek.

V roce 1955 bylo několik firem pro výrobu nožářského a také kancelářského zboží sloučeno v jeden národní podnik - Mikulášovický kovoprůmysl s ochrannou známkou MIKOV.

Tradice zavazuje - ani dnes ji n.p. Mikov nezůstává nic dlužen. Pod ochrannou známkou Mikov a "Šermíř" vyváží nožářské zboží:

nože kuchynské

řeznické

ocílky

dýky

lovecké nože zavírací

kapesní nože celonerez a se střínkami z plastu
a další v různém provedení

nůžky všeho druhu

zahradnické nože

elektrikářské

do 58 zemí, prostřednictvím PZO Merkura.

Kancelářské výrobky n.p. Mikov vyváží prostřednictvím PZO Pragoexport do 67 zemí, pod ochrannou známkou KIN.



Ořezávací strojky na tužky
děrovače, sešívačky, mechaniky do pařadačů,
obrušovátka, barevnáky, stojánky na razítka,
připínáčky, spony - dopisové, vzorové, akto-
vé a řadu dalších kancelářských potřeb.

Inovaci výroby a racionalizací výrobních procesů je n.p. Mikov kvalitou svých výrobků na světové úrovni. Dokladem udělení zlaté medaile Mezinárodního veletrhu spotřebního zboží v Brně.

V roce 1978 za kapesní nože řady 100-NH-1 až 6 a řeznické nože 439-NH-4,5,6.

Druhá Zlatá medaile jubilejního X. MVŠZ 79 byla udělena za lovecké zavírací nože řady 232-NP-1 až 6.

Je velkou ctí nejen pro výrobek, ale především pro výrobce získat oficiální uznání v mezinárodní soutěži.

Udělení Zlaté medaile zvláště v roce 185. výročí založení nožářské výroby je obzvláště významnou poctou a zároveň také pobídkou a závazkem k ještě zodpovědnější práci nožířů a všech zaměstnanců n.p. Mikulášovický kovoprůmysl.

Pobočné závody:

10 Benešov nad Pl.

20 Česká Lípa

Provozy:

03 Mikulášovice

11 Vilémov

12 Mikulášovice

13 Lipová

Mikov

NOSITEL ŘÁDU PRÁCE

185 let

TRADICE NOŽÁŘSKÉ VÝROBY

V MIKULÁŠOVICÍCH

**ZÁVODY ELEKTROTEPELNÝCH
ZAŘÍZENÍ**


NÁRODNÍ PODNIK

NOSITEL STÁTNÍHO VYZNAMENÁNÍ

»ZA VYNIKAJÍCÍ PRÁCI«

**ZEZ
PRAHA**

**Monopola produktado
de industriaj elektro-
hejtiloj en ĈSSR**



ZSE PRAHA

KOVOVÉ GARÁŽE

z ocelového plechu - základní nátěr
-dvoudílná vrata - sedlová střecha
-bez podlahy - snadná montáž buď
na podezdívku neb rovný terén.

Délka 4400 mm - cena 4.840,- Kčs

